

Pri la proza literaturo de Esperanto post IFA-kurso de Herbert Mayer.
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1981 oktobro 01 kaj 03.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1981-81/SRI-1981-81-2-519-Claude-GACOND-Pri-la-proza-literaturo-de-Esperanto-post-IFA-kurso-de-Herbert-Mayer.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia Claude Gacond.

Ekde Pentekosto, ĝis meze de septembro disvolviĝis en La Chaux-de-Fonds, kadre de la aktiveco de Internacia Feria Altlernejo (IFA) de Kultura Centro Esperantista (KCE) tre interesa kurssesio. Apud la elementaj kaj progresigaj kursoj de esperanto, rimarkinde altkvalitaj estis la kursoj pri literaturo, kiujn gvidis Ed Borsboom kaj Herbert Mayer, literaturistoj el Nederlando kaj Aŭstrio. Hodiaŭ mi aŭdigas al vi konversacion, kiun mi havis kun s-ro Herbert Mayer post la fino de lia kurso pri la esperanto-prozistoj.

Herbert Mayer, vi havis fakte la honoron konkludi la kurs-sesion de 1981 de Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, gvidante studsemajnon, kies celo estis doni unuan kontakton kun la esperanto-prozistoj. Kian impreson lasas al vi tiu ĉi unua kurso, kiun vi gvidis en La Chaux-de-Fonds?

HM.- Fakte estis por mi granda sperto foje en pri granda rondo paroli pri mia ŝatokupo, la esperanta literaturo. Tiu kurso permesis al mi prezenti la laboron de, ni diru, almenaŭ unu jaro. La diversaj diskutoj dum la kursoj permesis al mi kolekti la plej diversajn vidpunktojn kaj tio plilarĝigis mian perspektivon.

Cl.- Mi divenas ke ne devis esti tre facila afero pretigi bazan kurson pri la esperanto-prozistoj. S-ro Herbert Mayer, kiujn ĉef-problemojn vi renkontis en la pretiĝo al tiu ĉi kurs-gvidado?

HM.- Do la plej malfacila tasko estas havigi al si la necesajn originalajn verkojn. Vi verŝajne ja scias, ke gravaj kaj decidaj verkoj de nia literaturo estas elĉerpitaj. Aliflanke preskaŭ ne ekzistas altnivela literatura kritiko. Mi devis do komenci preskaŭ je la nivelo nulo.

Cl.- Ĉu vi antaŭvidas redoni tiun ĉi kurson? Kiu estis fakte tre tre bona.

HM.- Jes, Kultura Centro Esperantista invitis min ripeti tiun kurson en aŭgusto 1982. Mi verŝajne eĉ havos la eblecon doni duan kurson, pri esperantaj satiroj.

Cl.- Do vi aŭdas geaŭskultantoj, ke en 1982, se vi ĵaluzas tiun ĉi eblecon ĉi-jaran, vi povas rehavi tiun bonan kurson. Kaj ĉu vi antaŭvidas iel publikigi eseon, kiun interesatoj pri la temo povus akiri ?

HM.- Fakte mi ŝatus elmeti al publiko mian laboron por pli vasta pridiskuto. Dum la venonta jaro do aperos kontribuoj sub formo de mallongaj artikoloj en la Monata Cirkulero de la Kultura Centro Esperantista. Tiel mi esperas emfazi la neceson de literaturkritiko kaj diskonigi la bazajn konojn pri nia literaturo.

Cl.- Ĉu vi opinias, ke bazaj kursoj pri la esperanto-literaturo povas iel favori la disvolvigon de nia literaturo, helpi la verkistojn ekzemple?

HM.- Fakte jes. La disvolviĝo de nia originala literaturo dependas de la klereco de la publiko. Kaj la kursoj de la Internacia Feria Altlernejo celas ja tiun klerigon de la publiko. La IFA

edukas la esperantistojn kaj tiamaniere helpas pliriĉigi ilian kulturan vivon kaj krei la bazon por originala literatura produktado.

Cl.- Koncerne la literaturon, ĉu vi havas la impreson, ke esperanto povas fieri aŭ kontraŭe devas honti, pri la propra literaturo?

HM.- Mi konvinkite diras ke ni devus fieri. Ne necesas ke ni nun ripetu ke la esperanto-literaturo en si mem estas unika fenomeno. Kaj oni tuj formetos ĉiun minus-komplekson, se oni konatiĝas kun la kreemo de nia poezio kaj prozo.

Cl.- Se vi devus per kelkaj frazoj karakterizi la plej originalajn trajtojn de la esperanto-literaturo proza, kion vi dirus ?

HM.- Malfacila tasko. Malgraŭ la granda unueco mi asertus, ke la heterogeneco estas pli grava kaj pli evoluanta ol en nacilingvaj literaturoj. Sed tamen oni distingas klarajn tradicio-liniojn. Unu linio estas la literaturo, kiu analizas kaj prilumas la socion. La plej eminenta verko el tiu grupo estas eble la romano 'Vojaĝo al Kazohinio' de Szathmári. Alia tradicio sekvas poramuzajn celojn. Precipe en nia periodo tiu ĝenro konkeris vastan publikon. Temas pri aŭtoroj kiel Bocker (?), Valano kaj Lorjak.

Cl.- Ĉu vi opinias, ke la organizo de kursoj, kiel faras Internacia FERIA Altlernejo de KCE povus utili al aliaj centroj kaj do ne nur al tiu de La Chaux-de-Fonds? Kaj kiel vi vidus tiun ĉi kunlaboron?

HM.- La kursoj de IFA ja ne nur atingas la svisojn, sed la tutan Eŭropon: ekz. Francion, Italion, Germanion, Pollandon, Hispanion, Aŭstrion ktp. Tio signifas, ke tiuj kursoj kontribuas al la koncernaj landaj movadoj, sen ke tiuj pri tiu fakto konscius.

Cl.- Jes. Kaj ĉu vi nuntempe studas precizajn temojn rilate al la esperanto-literaturo? Aŭ ĉu nur ĝenerale interesiĝas pri ĝi ?

HM.- Ambaŭ, jes, ambaŭflanke. Unuflanke mi klopodas havi vastan kaj ĝeneralan superrigardon. Aliflanke estas kelkaj temoj pri kiuj mi nuntempe speciale interesiĝas. Ekzemple la demando ĉu la diversaj literaturoj, literaturaj skoloj distingeblas ankaŭ lingve, aŭ la interrilato inter la publiko kaj la verkistoj de tiu speciala kazo de esperanta literaturo. Speciale en tiu rilato la kursoj de IFA donis al mi, kaj mi esperas, donos grandan instigon.

Cl.- Kaj vi verŝajne ankaŭ studas la aŭstrajn verksitojn, ĉu ne, esperantistajn, ĉu vi komencis ?

HM.- Jes, estas kelkaj kiujn oni komplete forgesis kaj la plej grava estas Weinengs (?). Fakte preskaŭ ĉiuj laboris en la intermilita periodo kaj estis iel ligita al Literatura Mondo.

Cl.- Kaj pereis poste dum la faŝisma periodo.

HM.- Jes, do ili estis murditaj en la jaro 1939 kaj pereis aŭ ili simple eksilentis pro timo kaj pro la mondmilito poste. Kaj la mondmilito lasis la movadon en Aŭstrio en tre malbona stato kaj ankaŭ la literaturon.

Cl.- Kaj nun, kiu estas via preferata aŭtoro proza?

HM.- Malfacile por diri. Fakte mi havas plurajn. Ekz. Szathmári kaj lia ‘Vojaĝo al Kazohinio’, aŭ Varankin aŭ Rudyard (?). Sed mi ankaŭ ne volus rezigni je [Vallienne](#) kaj lia ‘[Kastelo de Prelongo](#)’. Do, ĉiuj tiuj aŭtoroj estas malfacile kompareblaj inter si kaj unikaj en sia ĝenro. Do, vi vidas ke nia literaturo estas jam relative kompleksa kaj ne necesas havi ĉi-koncerne minus-komplekson.

Cl.- Kiel vi konstatis per tiu interesa konversacio, kiun mi havis kun Herbert Mayer, unu el la junaj instruistoj de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, la kursoj, kiuj disvolviĝas en La Chaux-de-Fonds, atingas signifoplenan nivelon. Ni estas konvinkitaj, ke tiuj someraj kurs-sesioj pli kaj pli altiros en Svislandon la esperantistojn, kiuj deziras kleriĝi.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond konversaciis kun Herbert Mayer pri la aktiveco de Internacia FERIA Altlernejo kaj pri la originala esperanto-literaturo. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*